

Boulogne sur Mer  
31, Boulevard Mariette  
la 27<sup>an</sup> de Junio 1924

Kara Samideano.

Tiom da P.K. da presaĵoj, da afablaĵoj k.t.p. meritas leteron + mi skribas letere al vi kvankam mi atendas ankoraŭ respondan leteron vian al mia letero de la 31<sup>a</sup> de Marto!

Mi tamen vidas ke vi ne forgesis min + nun kiam la Kongreso alproksimiĝas, vi rememoras min sendube ankoraŭ pli bone, pripensante al la Praha Kongreso. Vi do vidas kiom Kongresoj estas necesaj por konservi la bonajn rilatojn inter amikoj + samideanoj .

Mi estis tre tuŝata pri via afabla invito iri al Přelouč + tre profunde dankas vin. Bedaŭrinde mi ne kredas ke estas eble ke mi akceptu ĝin, ĉar mi revenos tra Salzburg + tra Svisujo. Mi tute ne deziras trapasi Germanujon, precipe Bavarujojn. Sed, vi ne dubos kiel mi estus ĝojinta vidi vian urbeton + konatiĝi kun viaj hejmo + ĉirkaŭaĵoj. Lucien + mi tut'kore dankegas vin sed la cirkonstancoj estas pli fortaj ol nia volo.

Mia edzo estas treege laca + la D<sup>roj</sup> forte konsilis al li ripoziĝi en montara regiono aŭ sur la kamparo. Pro tio, li sendube ne iros al la Kongreso + mi iros sola. Ĉiu maniere, li ne estus farinta la vojaĝon kun mi ĉar li estos en Alsaco kun la filo + aliaj advokatoj dum 5 tagoj por festigi 20<sup>an</sup> datrevenon de amika advokata asocio kiun li fundis.

Li do intencas ripoziĝi en Alsaco + Svisujo ĉar li devas iri al Genevo por aferoj. Li forlasos kun la filo, Boulogne la 30<sup>an</sup> de Julio + mi, la 31<sup>an</sup>. Mi iros rekte al Zurich ke mi kusiĝos<sup>1</sup> la 1<sup>an</sup> de Aug, forlasos Z. + alvenos en Salzburgon meznokte la 2<sup>an</sup> + restos en S. du aŭ tri tagojn. Mi esperas alveni Wienon la 4<sup>an</sup> aŭ 5<sup>an</sup>. Tiele mi povos iom ripozi post la vojaĝo. Mi iom timas la vojaĝon ĉar mi ne parolas germane, sed mi supozas ke ĉio aranĝiĝos. Mi ofte vojaĝis sola + eĉ al Anglujo dum la milito + tio estis tre komplikata + danĝera.

En Vieno, mi esperas trovi malnovajn + novajn amikojn + sen ĝeni ilin la tutan tempon, esti kun ili tamen iomete, por ne senti min tro sola. Mia edzo bedaŭras multe + bedaŭros multe – sed li pensas ke estos pli saĝe + prudente ne ĉeesti la Kongreson + ne fari tiun lacigan vojaĝon tuj post la 5 tagoj en Alsaco. Vi povas simagi ke 5 advokatoj kune kun en libertempo ne estas ripozante.

Eble, mi de nove restos en Salzburgo revenante ĉar oni jam organizis ekskursojn apude. Mi sendube retrovos mian edzon en Svisujo.

Mi jam havas miajn kongreskartojn + baldaŭ sendos mian al Parizo kun pasporto por la vizo Austria. Ĝi kostas 100 frankojn sed la Kongresanoj obtenos 50% da rabato.

Kiel mi esperas ke la vetero ne estas tiel varma kiel en Praha! Estas bedaŭrinde ke ne estos balo, ĉu ne? Mi devas renkonti du ne konatajn korespondantojn en Wien: S<sup>ron</sup> Hain, portretisto loĝanta en Wien ĉiam + iom aĝa + D<sup>ron</sup> Broder el Varsovio, iom juna, kun kiu mi multege korespondis. Li devas viziti nin, hejmen, sed mi ne scias ĉu estos antaŭ aŭ post la Kongreso.

Nature, mi vidos plezure S<sup>ron</sup> Ŝos kiu estas Wienano. Ĉu vi memoras lin? Sendube S<sup>ino</sup> Zamenhof + la bofrato Felikso Zamenhof ĉeestos. D<sup>ro</sup> Leono ne venos. Li preferas, li skribas, elspezi sian monon por viziti nin en 1925. Mi ankaŭ korespondas kun S<sup>ro</sup> Felikso.

La edzino de mia 6jara korespto S<sup>ino</sup> Guerra, el Meksikujo elŝipiĝis ĉi-tie, la 20<sup>an</sup> de Majo + restadis kelkajn tagojn en nia hejmo. Ŝi estos ĉe la Kongreso + estos eĉ delegitino de Meksikujo. Ŝia edzo vizitos Eŭropon + nature, nin, en Oktobro dum ŝi restos en Meksikujo.

Ĉu vi iros sola al la Kongreso aŭ ĉu via edzino vin akompanos? Ĉu vi jam estis en Wien? Mi jam estis 2foje sed ne memoras multe. Se mia edzo ne venos, ĉiuj certe estos surprizataj ĉar oni neniam vidis nin unu sen la

---

<sup>1</sup> Ĉu "kusiĝos" ?

alia. Li diris al mi ke mi devas skribi al vi kiom li bedaŭros ne revidi vin, ĉar vi estas tre simpatia al li.

Do, nun, kara D<sup>ro</sup>, mi forlasas vin + sendube la proksiman fojon kiam mi salutos vin estos vere la mano preminta manon + voĉe, ĉu ne?

Dankon de nove por via afable invito + ĝis la baldaŭa revido. Mi esperas ke vi ne forlasos la Kongreson post 3 tagoj tiun-ĉi jaron.

Ĉiam la sama

A. Sergeant.

<sup>2</sup>

<sup>3</sup>

---

<sup>2</sup> Noto marĝene de la unua paĝo: "Jen P.M. ne ŝtampita kiu estas senvalora por mi."

<sup>3</sup> Manskribita noto je la fino de la letero: "odp. 9/7/24"